

KEA



Kuba Esperanto-Renkontiĝo

13-17 marto 2013

Feriejo Los Cocos

Playa Jibacoa, Santa Cruz del Norte, Mayabeque, Kubo

Saluton!

Post la sukcesa pasintjara okazigo de simila aranĝo, Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la internacian E-Renkontiĝon KERo 2013.

Plene rezervita por tiu ĉi evento, la belega feriejo Los Cocos [La kokosoj] troviĝas sur la vojo de Havano ĝis Varadero en Plaĝo Jibacoa kaj estas ideala por junulara kaj familia turismo. Ĝiaj komfortaj ĉambroj, oportunaj servoj de kafeterio kaj restoracio, naĝejo, diversaj ekskurseblecoj kaj multo alia pliriĝigos la intensan programon por praktiki la lingvon, ĉio ĉi en rava naturo kaj ĉemara medio.

Aliĝkoto. La aliĝkoto inkluzivas **(a)** veturon laŭ la itinero KEA – Havano – Feriejo Los Cocos – Havano – KEA; **(b)** loĝadon dum 5 tagoj kun 4 tranoktoj en 6/8-litaj ĉambroj; **(c)** maten-, tag- kaj vespermanĝon.

Rimarkoj. Bonvolu atenti, ke **(a)** La aliĝkoto ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Renkontiĝon pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo; **(b)** Komitatanoj pagas 50 %; **(c)** Ne membroj de KEA pagas la aliĝkoton plus CUP 50.00; **(ĉ)** Infanoj (ĝis inkluzive 6-jaraj en la 31.12.2012) pagas 50 % de la aliĝkoto.

Kiel pagi? Pagi oni povas kontante ĉe KEA aŭ per poŝtmandato adresita al: S-ino Ismary Lezcano García, Asociación Cubana de Esperanto, Vista Alegre 264 entre Juan B. Zayas y Luz Caballero, La Vibora, 10 de Octubre, 10500 La Habana. Pliajn informojn vi povas peti ĉe KEA telefone (640 4484, 13h00-19h00) aŭ retroŝte: info@esperanto.co.cu.

Ĝis revido en KERo 2013!

Aliĝkotoj (por kubanoj, en CUP)

Teritorio / Periodo	Ĝis 31.12.2012	Ekde 01.01.2013
a) Okcidento (PRI, ART, LHA, MYB, MTZ)	150.00	180.00
b) Centro (CFG, VCL, SSP, CAV kaj ISJ)	120.00	150.00
c) Oriento (CMG, LTU, GRA, HLG, SCU, GMO)	100.00	120.00

Por eksterlandaj partoprenantoj la aliĝkoto estas EUR 150.00 (surloke pagenda) kaj ĝi inkluzivas la samajn kondiĉojn kiel por kubanoj, plus loĝadon en dulita ĉambro kun klimatizilo, kablo-televideo, privata necesejo/duŝo.



La programo. Dum KERo kunsidos la Komitato de KEA kaj okazos multo alia: Klerigaj aranĝoj (kursoj, seminarioj, ekzamenoj); distraj aranĝoj (ekskursoj, ludoj, filmoj, konkursoj, danco-kursoj); aktivulaj seminarioj (informado, financo, junularo); fakaj aranĝoj (kunsidoj, prelegoj); sportaj aranĝoj (volejbalo, futbalo, pedalboata konkurso, k.m.a.); artaj aranĝoj (koncertoj, teatraĵoj); diskoteko kaj ĉiutaga radioelsendo. La organizantoj antaŭvidas riĉan programon kaj via persona kontribuo certe ne rajtas manki en ĝi.

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, 10500 Havano, Kubo
+53 (7) 640 4484 (13h00-19h00)

info@esperanto.co.cu / www.esperanto.cult.cu

